

& Sur strato:

< Rekante 32 el 65 batoj por strofo, entute 390 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:65> (So /do domi re refa mi miso fa fa;fa mi remi fa redo Ti LaTi So So;So do domi re refa mi miso fa fa;fa mi remi fa redo Ti LaTi do do;So

(#Rekantaĵe: do domi re refa mi miso fa fa;fa mi remi fa redo Ti LaTi So So;So do domi re refa mi miso fa fa;fa mi remi fa redo Ti LaTi do do)

)×6)+

(&Strofoj:

< Sceno el efektiva vivo.>

'1 Sur /strato promenas gravega sinjoro:
; Li ĵus fortagmanĝis, kaj iras kontenta,
; Kun plena ventrego, kun ĝojo en koro,
; Senzorga, trankvila, fiera, sensenta.

(×: **Ĉu riĉa, malriĉa, malĝoja, feliĉa, ;
la vivo nin sendas, pri trivo ni
plendas. ; Sed homoj kun ĝojo en
domoj, sur vojo ; naskiĝas kaj vivas
nur unu ĉi fojon.)**

'2 Subite al li knabineto aliras. ;
Malgraŝa ŝi estas, en vesto malriĉa, - ;
Plorante, ŝi manon etendas kaj diras: ;
"Ho, donu almozon al mi, maldfeliĉa!"
.....

'3 - For, for, abomena, senhonta
knabino! ; Labori vi devas, almozon ne
petu! ; Vin sendis, kredeble, malĉasta
patrino ; Por ke je almozo vi brandon
aĉetu?

'4 "Ho, ne, estimata, aminda sinjoro! ;
Patrino... ho, mia karega patrino! ; Ŝi,
eble jam mortis en tiu-ĉi horo, ;
Malsana ŝi estas. - Ne, truda knabino,
.....

'5 Foriru, foriru! Al via rakonto ; Ne
kredas mi tute : ĝi estas malvera. ; For,
for! ne mensogu! Al vi estas honto ;
Pasantojn trompadi per vido mizera!"
.....

'6 Kaj ree promenas gravega sinjoro ;
Kun plena ventrego, kun vido kontenta,
; kun nigra animo, kun ĝojo en koro, ;
Feliĉa, trankvila, fiera, sensenta.)